POR INFORMO

ANKAŬ VI ĈEESTU EN HERSTAL

la 20 an kaj 21 an de septembro 1975

LA INAŬGURON DE LA PONTO DE L'ESPERANTO

trans Moso kaj Albert-Kanalo

je la trilanda renkontiĝo!

Herstal, la 12 an de junio 1975.

Karaj gesamideanoj,

Vi estas tutkore invitataj partopreni la trilandliman renkontiĝon kiu okazos ĉi-tiam en Herstal, apud Liegô, en Belgio, la 20 an kaj 21 an de septembro 1975.

Via ĉeesto estas tiom pli dezirebla ke nia movado inauguros " PONTON DE L'ESPERANTO".

Tiu eksa ponto de Wandre, interkomunikigas la urbojn Wandre koj Herstal trans Moso kaj Albert-kanalo.

La bapta oficiala ceremonio gravas por konigi nian internacian lingvon kaj helpi al ĝia disvolvo en niaj tri landoj.

Estos oficiala akcepto de la partoprenantoj en la urbodomo, inaugura ceremonio, laborkunsido, vizito al vidindaĵoj, ekskurso, loĝado kaj manĝado en la plej komfortaj kondiĉoj.

Vidu la programon.

La Herstal-Lieĝa grupo atendas vin.

Ne prokrastu aliĝi, ni konsilas al vi, ĉar ju pli rapide vi anoncos vin, des pli bone ni preparos nian aferon.

Dankon. Tutkore via,

Por la .L.K.K. S-ino Elise Dujardin.

Por informoj, skribu al S-ro Albert Heuschen.
The post House Hotel. 4400. Herstal.

TRILANDA RENKONTIĜO EN HERSTAL.

P R O G R A M O

Sabaton, la 20an de septembro 1975 :

08:30 - 10:00 - Je la Hotelo Post House, akcepto de la partoprenantoj.

10:00 - Je la urbodomo : oficiala akcepto.

12:00 - Akompano al la Ponto-inaŭguro.

13:30 - 15:00 - Tagmezmanĝo (hotele).

15:00 - 18:00 - Laborkunsido (je kultura centro).

18:30 - Vespermanĝo (hotele).

19:00 - Distra folklora vespero. (Kultura centro).

Dimanĉon, la 21an de septembro :

09:00 - Di-servoj.

10:00 - Vizito al muzeoj kaj bazaro "La Batte".

12:30 - Tagmezmanĝo.

14:00 - Ekskurso al Bokrijk (Bokrejk).

18:00 - Adiaŭo.

INFORMILO PRI LA SERVOJ

I. Aliĝkotizo :

1) Izolita aliĝanto aŭ unua familiano pagas 90 belgajn frankojn.
2) Ĉiu plia familiano pagas 60 B.F.
3) Ĉiu infano malpli aĝa ol 12 ne pagas.

II. Loĝado : prezoj po unu persono.

1) Sin anonci antaŭtempe nur garantias loĝadon en unuaranga hotelo : Post House :
en dulita ĉambro : 450,- B.F.
en unulita ĉambro : 600,- B.F.
+ 1 kontinenta matenmanĝo : 70,- B.F.
2) Oni povas elekti duarangan hotelon : Hotel de Bavière (pli fore de la centro herstala, Liège)
en dulita ĉambro : matenmanĝo enkalkulita, aŭ en trilita ĉambro (tria lito por infano) :
310,- B.F. po persono.
Tiuj kiuj elektos tiun-ĉi hotelon devos mem veturi al ĝi aŭ ĝin atingi per publika bus-servo.

III. Manĝado je Hotelo Post-House :

Unuaranĝajn menuojn. Trinkaĵo ne enkalkulita, sed akvo senpaga kaj kafo ricevota post manĝo senpage.

1) Sabata tagmezmanĝo : 300,- B.F.
2) Sabata vespermanĝo : 200,- B.F.
3) Dimanĉa tagmezmanĝo : 300,- B.F.

IV. Aŭtoĉara servo por translokiĝi dum la ambaŭ tagoj : minimume 10 vojaĝetoj de unu loko al alia. Servo ne devigata se vi kapablas uzi vian propran veturilon.
Aŭtoĉara servo-abono : 50,- B.F.

V. Aŭtoĉara ekskurso : Po persono, la vojaĝo al Bokrijk (Bokrejk) : 130,- B.F.

Bone notu ke nur aliĝkotizo estas devigata por rajtigi partoprenon.
Sed, kompreneble, ĉeesto je la diversaj aranĝoj multe helpas al kontaktplena vivanta renkontiĝo.

Konsideru ke 1 nederlanda guldeno aŭ 1 germana marko valoras 15 belgajn frankojn kaj indiku la monsumon en belgaj frankoj.

A L I Ĝ I L O

Tiun-ĉi aliĝilon, tuj sendu (aù plejeble rapide) al S-ro Albert Heuschen, Post-House Hotel - 4400 HERSTAL, Belgio.
Lasta enskribiĝdato garantianta la servojn : 7an de septembro 75.
Plej frue sin anonci helpos al bona preparado - Dankon.

Mi partoprenas la trilandan renkontiĝon en Herstal, la 20an kaj 21an de septembro 1975 -

NOMO : ..... Antaùnomo : .....

ADRESO : Lando : ..... Urbo : .....

Strato : ..... N° .....

Telefon-numero : .....

I. Mi pagas la kotizon :

Por mi-mem : ..... 90,- B.F.

Por plia(j)n persono(j)n ..... X 60,- B.F. = ...B.F.

Kotizo(j) entute : .....,- B.F.

Mi deziras uzi la servojn kaj tiele pagas :

II. Tranokto_hotele-unuarange

En unulita ĉambro por ..... persono(j) (600,- B.F.).....B.F.

En dulita ĉambro pør ..... persono(j) (450,- B.F.).....B.F.

Hotele-duarange

En du aù trilita ĉambro por .....persono(j)(310,-BF.).....B.F.
Maten-manĝo enkalkulita en la prezo.

Tranokto_entute : .....B.F.

En la hotelo, mi kunkune tranoktos kun :
NOMO .....Antaùnomo kaj ..... infanoj.

III. Manĝado komuna_

Unuarangaj menuoj, trinkaĵo ne enkalkulita krom akvo senpaga kaj kafo ricevata sen plia pago je manĝofino.

Sabata tagmezmanĝo por ..... personoj : .....X 300,- = ...B.F.
Sabata vespermanĝo por ..... personoj : .....X 200,- = ...B.F.
Dimanĉa tagmezmanĝo por..... personoj : .....X 300,- = ...B.F.
Dimanĉa kontinenta matenmanĝo (nur por tiu(j) kiu(j) tranoktas en hotel Post-House) .....X 70,- = ...B.F.

Manĝado, entute : .....B.F.

IV. Mi deziras aboni je la komuna translokiga aùtoĉara servo, por ..... personoj ; .....X 50,- = ...B.F.
Mi partoprenas la ekskurson kaj pagas :
por ..... personoj .....X 130,- = ...B.F.

Entute : .....B.F.

RESUMA KOMPLETA KONTO

Entute :

I	aliĝkotizo(j)n	: ..... B.F.
II	Hotelkosto(j)n	: ..... B.F.
III	Manĝo(j)n	: ..... B.F.
IV	Autoĉarservo(j)n	: ..... B.F.
	Entute	: ..... B.F.

Tiun-ĉi sumon, mi ĝiras al la p.ĉ.k. N° 000-0975533-04 aŭ al la banko-konto N° 240-0661023-69 de Sro Albert Heuschen, 155, Strato de Hermée, 4400 Herstal, Belgio.

Subskribo ;

Dato :

Dimanĉon (de la 10a ĝis la 12a horo)

Mallonga vizito al la monumentoj, placo "Licour" (La Kortego) en Herstal.
Sur la angulo de la placo, la belega domo en Renesenca stilo - Herstala venonta muzeo - plaĉos al vi. Tie, vi admiros la diversajn kamenojn (de 17a kaj 18a jarcentoj), plafonojn, k.t.pl.

La malantaŭa parto de la preĝejo datiĝas de la epok-fino de Karlo la Granda (en la muroj, ŝtonoj ordigitaj fiŝost-forme).

Aŭtoĉare, ni veturos Liego kaj restados tie ĝis la 12a.
Vi elektos, ĉu la viziton de la famkonata bazaro "La Batte" kies deveno intermiksiĝas kun tiu de la urbo, ĉu la viziton de la muzeo "Curtius". Tiu arta - arkeologa - historia muzeo okupas tre luksan hotelon de la 16a jarcento, flanke de la Moso.

x
x x

Post la tagmanĝo, ni kune vojaĝos al Bokrijk (Bokrejk) - plenaera muzeo de la kampara vivo en flandra lingva parto de Belgio.
Plie ni vidos kamparajn vilaĝetojn, belege restaŭritajn . La malnova gastejo proponos al vi diversajn tipajn trink-kaj-manĝaĵojn. Se vi deziras promeni, multaj vojetoj tra arbaroj, en agrabla natura parko invitos vin.

Kompreneble, la partoprenantoj ricevos antaŭ kaj dum la vizitadoj, multajn klarigojn pri diversaj distroj : esperanta gvidanto akompanos vin !

LA HERSTAL-LIEĜA GRUPO ATENDAS VIN.

x
x x

Laborkunsido : (Sabate posttagmeze)

Okazos prelego de Sro Moritz, el Germanio, prelego kaj lumbildoj de gesinjoroj Close, el Belgio, pri historio kaj arkeologio en la Herstala Sirkaŭa regiono kaj foruma ide-interŝanĝo. pri ĉiuj temoj : demandoj kaj respondoj (ekzemple : kiel fariĝis Ponto de Esperanto) kaj decido pri la sekvonta trilanda renkontiĝo.

Distra vespero : (Sabate vespere)

- Folklora arta malnova muzik-danc-orkestro "L'Gaw" movigados la ĉeestantojn.
- Diradon de famaj poemoj de Garcia Lorka kaj Pablo Neruda, fare de Hugeta Tholet vi aŭskultos.
- Fabelojn diros Sro. Emile Gillet.
- Komune ni kantos kaj dancos.

KIO ESTAS "LU GAW" ? (li gaù)

Estas iu muzikinstrumenteto antaùe tre uzata tra Valonio.

Tial la membroj de folklora grupo elektis tiun nomon por ilia danc-kaj-kant-folklororkestro.

Malnovajn instrumentojn, ili ludas, kiel flutoj, klarnetoj, akordeono, rada kordogurdeto, boatistaj kokokaĝoj kaj kornemuzo.

Konatiĝu kun malnovaj kantoj kaj dancoj de niaj gepatroj : dum kelkaj horoj, retrovu vin en pasinta tempo de la 18a kaj 19a jarcentoj partoprenante la distran vesperon sabate 20an de septembro je la trilanda renkontiĝo en Herstal.

+ + + + + + + + + + + + + + + + +